

目次

El la 92a Universala Kongreso de Esperanto

De superregado de “okcidento” al “interlokaj dialogoj”	Usui Hiroyuki	3
Disvolviĝo de la japana kulturo en Eŭropo el la ekzemplo de Mangao en Pollando	Aleksandra Watanuki	7
La rusa kulturo kaj la japana socio	Sergey Anikeev	10
“Okcidenteco” en la ĉina lingva medio: akcepto kaj rezisto	Mai Wenbiao (Bill Mak)	17
Esperanto kiel lingvo kaj ideo en Ĉinio kaj Japanio	Ulrich Lins	37
Okcidento en Oriento: Prosperiga Defio	Ahmad Reza Mamduhi	52
La akcepto, la rezisto kaj la diglosio: la kazo de la angla en Barato	Probal Dasgupta	58
De modernismo al postmodernismo: La ŝanĝiĝanta evoluiga tagordo en Barato	A Giridhar Rao	64

第5回 新渡戸記念国際シンポジウム より

エスペラントはアジアの言語か? —— 変動する言語生態系における 促進要因と阻害要因	マーク・フェテス (北川 久 訳)	69
母語の活力: 翻訳による言語の育成	プロバル・ダシグプタ (臼井裕之 訳)	81

投稿論文

北一輝のエスペラント採用論~その源泉と実践, そして展望	臼井裕之	87
『言語権的価値』から見たエスペラントとエスペラント運動 —— 言語学習観と言語規範意識を中心に	かどや ひでのり	109

書評

Ziko Marcus Sikosek: <i>Sed homoj kun homoj: Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005</i> (Rotterdam 2005, 197 p.)	渡辺克義	127
Raporteto: <i>Esperantologia Konferenco en la 92a UK</i>	Sibayama Zyun'iti	130
投稿規定		131

(2) Id. p. 73.

Iwama, Seiko. *Giriŝa seikyou to nihon no bunka*. (La ortodoksa religio kaj la japana kulturo.). p. 106. - Indikoj pri jaro kaj eldonloko mankas.

(3) Ivanova, G.D. Opus. cit. p. 89.

(4) Id. p. 89.

(5) Id. p. 93.

(6) Id. p. 108.

(7) Id. p. 90.

(8) *Vostok*. (La Oriento). Yokohamo, 1908, No 1-2.

“Okcidenteco” en la ĉina lingva medio : akcepto kaj rezisto

麦文彪 Mai Wenbiao (Bill Mak)

0. Enkonduko

Kiam oni petas, ke mi parolu iom pri la kongresa temo, mi vere hezitas: *Okcidento, Oriento, akcepto kaj rezisto*. Kio ja estas *Okcidento*? Kio ja estas *Oriento*? Surface, la demandoj ne estas tiom komplikaj. Ni povas diri kun ia imagita linio, dividante la eŭrop-azian kontinentegon: *Okcidento* estas geografie okcidenta parto de la mondo, t.e., Eŭropo; *Oriento* estas Azio. Kulture, *Okcidento* estas greko-romana kaj hebrea-kristanisma; male, *Oriento* estas konfuceisma, budhisma aŭ io alia. Tiaj simplaj difinoj nur helpas nin kompreni certajn kulturajn fenomenojn, trajtojn kaj ĝeneraligojn. Post pli profunda studado, oni povas vidi, ke tiaj konceptoj estas plejparte artefaritaj. Konsciinte ties artefaritecon, ni evitu eblajn miskomprenojn. Azio ne estas unu homogene maso, nek lingve, nek historie, nek kulture⁽¹⁾. Interalie, por antikvaj ĉinoj dum jarcentoj *Oriento* signifis ne Ĉinion mem sed Japanion, kaj *Okcidento* estis Barato aŭ Hindio! Kompreneble, Ĉinio estas en la mezo de la mondo kiel la “mezolando”⁽²⁾.

En mia artikolo jena, mi celas ekzameni la koncepton de “Okcidento” en la ĉin-lingva medio, kaj spegulte de ĝi, ankaŭ la dinamikon inter ties akcepto kaj rezisto. Mi preferas “lingvan medion”, ĉar tio donas konkretajn faktojn. Per “lingva medio”, mi celas esprimi la diversajn aspektojn de lingvouzado, kaj interne kaj ekstere de la lingvo mem. En “lingva medio”, oni povas legi kaj aŭdi ion. Oni povas kune taksii ion kaj diri, “Ho, tio estas stranga. Tio ne venas el nia denaska kulturo. Tio venas el ‘Okcidento’.” Por mi persone, estas ĉiam interese rimarki elstaraĵojn, kiuj ofte rakontas al ni historion, kaj per kiuj oni ĉiam lernas ion pri kulturoj kaj fenomenoj homaj.

Kompreneble, la reala situacio estas multe pli komplika, ĉar kulturo mem estas koncepto. Denaska kulturo kreskas, evoluas kaj konstante ŝanĝiĝas – la ideo de iu ajn

eterna senŝanĝa kulturo ekzistas nur en nia fantazio. Ni parolu pri nur kulturo ene de ia formo en ties tempa, historia kaj geografia kunteksto. Same ankaŭ pri fremda kulturo. Ekzakte el la dinamiko inter la konstante ŝanĝantaj kulturoj rezultas buntaj kaj variaj kulturaj fenomenoj. Tio estas la kazo de la moderna ĉina lingvo, kaj en ĝi ne mankas tiaj spuroj de interkulturaj dialogoj.

1. La ĉina lingvo – kio ĝi estas ?

Antaŭ ĉio, ni ekzamenu la medion mem, la ĉinan lingvon⁽³⁾. La lingva situacio de Ĉinio estis tre komplika ekde antikva tempo. Ekzistas multaj lingvoj/dialektoj, kiuj ne estas interkompreneblaj. Ili tamen havas kelkajn komunajn trajtojn: izola strukturo kaj unusilaba morfemo. La morfologia kaj vortfarada sistemo estas tre “aktiva” (kiel Esperanto). Kiam ni parolas pri la ĉina lingvo, tamen ofte temas pri la skriba lingvo. La ĉina vortsignaro – sistemo de “simboloj de vorto”, estas la plej elstara trajto de la ĉina lingva medio⁽⁴⁾. Ĝi povas prezenti ideon, numeron, fonetikon aŭ kombinaĵon de ĉi-supraj. Malgraŭ la longa evoluo de la ĉina lingvo, ekde la pralingvo ĝis la nuntempaj modernaj ĉinaj dialektoj, la ĉina vortsignaro estas daŭre kaj vigle uzata, sen indikoj de malvigligo⁽⁵⁾. Laŭ la fama ĉina klerulo Jao Tsung-I, la ĉina vortsignaro kreskas kiel arbo, kaj ĝi rolas kiel ligilo de diversaj eroj de ĉinaj kulturoj, tratempe kaj traloke⁽⁶⁾. Tio ĉi estas tre grava punkto, ĉar, kiel ni vidos poste, malgraŭ la ŝanĝo de la lingvo, kaj interne kaj ekstere pro influo de Okcidento, la ĉina lingvo restas fundamente “ĉina” pro la skriba sistemo de vortsignoj, kaj rolas grave kaj eĉ sankte en la ĉina memidenteco⁽⁷⁾.

1.1 Fremdaj lingvoj en la okuloj de ĉinoj kaj eŭropanoj

La malsamaj konceptoj de fremda lingvo havas malsamajn konsekvencojn por la ĉinoj kaj la eŭropanoj.

Pro la unika lingva situacio de Ĉinio – la unusilabeco, toneco de la “ĉinaj lingvoj”, la ekzisto de tre ampleksa skribsistemo kaj ties historia evoluo, lingvo sen skribo estas tute neimagebla por ĉinoj. Tia antaŭjuĝo ofte rezultas malsaman aŭ eĉ eraran komprenon por ĉinoj. Ekzemple, multaj ĉinoj siatempe pensis, ke regado de la alfabetoj de fremdaj lingvoj egalas al regado de la lingvo. Tial Yijing (635-713 P.K.), fama budhana monaĥo de *Tang*-dinastio, kiu vojaĝis al Barato, en la enkonduko de sia

Fanyu qianziwen (Mil vortoj sanskritaj), sanskrita-ĉina vortaro, deklaris, ke necesas nur unu aŭ du jarojn por lerni la sanskritan por fari tradukadon de budhismaj sutroj. Por Yijing kaj ankaŭ multaj ĉinoj en tiu tempo, lingvo-lernado konsistis ĉefe el regado de skribado de vortoj. Gramatiko, prononcado kaj aliaj aspektoj de lingvoj ŝajnis al ili ne tiom gravaj⁽⁸⁾.

Por ĉinoj, lingvo samsignifas kiel skribado. Se iu fremda vorto eniras la ĉinan lingvon, la tuja demando estas, per kiuj vortsignoj oni prezentu ĝin. Depende de la vortsignoj elektitaj por la fremdvorto, la ĉinigita vorto povas montri malsamajn nivelojn de fremdeco por malsamaj celoj. Foje, per elektado de fremdecaj vortsignoj, oni altigas la fremdecon de la vorto, kaj espereble, ankaŭ la prestiĝon ligitan kun tiu fremdeco; foje, per pli ordinara vortsignoj, oni dezirinde malfremdigas la fremdan vorton⁽⁹⁾. En ambaŭ kazoj, ĉinigitaj fremdaj vortoj kvazaŭ fandiĝas en vortsignojn kaj aŭtomate iel perdas sian fremdecon⁽¹⁰⁾. Kiam ajn la vortoj eniras la ĉinan lingvon kun siaj deciditaj vortsignoj, la vorto longe restas kun la lingvo.

Kun eŭropaj lingvoj, la situacio malsamas. La utiligo de fonetika skribsistemo en Okcidento rezultas novan skriblingvon, kiam ajn la lingvo mem ŝanĝiĝas. Pro tio, la mezepoka angla aŭ franca aspektas kvazaŭ fremda lingvo al la modernaj angloj kaj francoj. Por ordinara ĉinoj, legado de la originalaj vortoj de Konfuceo, kiu vivis antaŭ pli ol 2500 jaroj, eblas dank’ al la vortsignoj.

Kurioze, tamen ĝuste pro tiu diferenco, ekzistas mito pri la ĉina skriblingvo, ke ĝi estas logika lingvo, kiu rekte prezentas ideon⁽¹¹⁾. Dum sufiĉe longa tempo, la komento de Leibniz pri la ĉina lingvo, ke ĝi estas laŭdinda logika lingvo, estas elstara ekzemplo⁽¹²⁾. En la verko “Eseo pri reala vortsigno kaj filozofia lingvo” de la 17a jarcento, John Wilkins kreis artefaritan lingvon kaj skribsistemon, inspirite de la ĉina skribsistemo⁽¹³⁾.

Jen estas la fonta historio: La koncepto de lingvo mem variis kaj varie evoluis en Okcidento kaj Oriento. Kiam ni ekzamenas la fremdajn elementojn en la ĉina lingvo, ni ne forgesu la unikecon de la ĉina skribsistemo, kiu, kvazaŭ giganta besto, kun ties nekredible forta historia daŭreco, kaptadas novajn elementojn kaj transformas ilin en sin mem⁽¹⁴⁾.

2. “Okcidenteco” en la ĉina lingva medio – akcepto kaj rezistado

Okcidenteco, aŭ simple fremdaĵo, en la ĉina lingvo havas longan kaj komplikan historion. Dum multaj jarcentoj Ĉinio ja estis unu el la plej prosperaj kaj evoluintaj landoj en la mondo. Pro tio, fremdaj kulturoj kaj vortoj dum longa tempo havis nur minimuman influon al la ĉina lingvo, krom eble la vortoj de fremdaj objektoj, manĝaĵoj kaj aliaj ekzotikaĵoj. Tiu bildo rapide ŝanĝiĝis ĉefe dum la du historie gravaj periodoj de kontakto inter Oriento kaj Okcidento:

1. La Nord-Sudaj periodoj ĝis meza *Tang*-dinastio (la 4a ĝis 8a jarcento P.K.), precipe pro la eniro de budhismo en Ĉinion;
2. La frua 20a jarcento post la disfalo de *Qing*-dinastio.

2.1 Budhismaj tekstoj el Barato

La koncepto de Okcidento por la etnocentrismaj “mezlandanoj” estas ĉiam klara, sed ekde la alveno de budhismo, Okcidento ekhavis novan signifon. Precipe, ĝi prezentas la novajn ideojn kaj mondkoncepton de la najbara lando Barato.

La budhisma teksto en la ĉina lingvo estas produkto el unu el la plej grandskalaj projektoj en la historio de tradukado. Ekde la 2a jarcento ĝis la 11a jarcento, dum preskaŭ mil jaroj, budhismaj tekstoj el Barato kaj Centra Azio estis tradukitaj en la ĉinan lingvon. Komence la tradukistoj tradukis novajn vortojn fonetike kaj laŭsignife. Iom post iom la budhismaj vortoj en la ĉina lingvo tiom kreskis kaj eĉ influis la diversajn aspektojn de la ĉina lingvo kaj ĉina literaturo ekde la 4a jarcento⁽¹⁵⁾. Ĉar budhismo havis tiom longan historion en Ĉinio, ĉinoj mem apenaŭ konsideras budhismon kiel fremdan religion. Eble nur filologoj povas rekoni ĉiujn sanskrit-devenajn elementojn en nia nuna ĉina lingvo, sed la fremdeco de multaj budhismecaj vortoj estas tamen memevidentaj ĉefe pro la malfacila fonetika transskribo, kiu mem ne havas signifon en la ĉina lingvo: *pusa* (菩薩 - bodisatvo /skt. *bodhisattva*), *puti* (菩提 - bodio /skt. *bodhi*), aŭ eĉ *fo* (佛 - Budho /skt. *buddha*)⁽¹⁶⁾.

La evoluo de la ĉina vorto por Budho estas ekzemplo, kiu helpas nin iom kompreni la dinamikon de akceptado kaj rezistado de fremdeco en la ĉina lingvo kaj la ĉina kulturo. Komence ekzistis pluraj fonetikaj transskriboj malsamaj de la sanskrita vorto *buddha* en la unua jarcento P.K., ekz. [bud-do]⁽¹⁷⁾. Iom post iom la unusilaba simpligo kun la vortsigno 佛 fariĝis la plej populara norma formo. Notu, ke ĉi tiu vortsigno,

kiel tipa vortsigno, konsistas el du partoj: la radiko maldekstre kaj la fonetika signo dekstre. La radiko 人 signifas, ke ĝi rilatas al homo. La fonetika signo 弗, dum la unua jarmilo, estis prononcata kiel [but] sed pro fonetika evoluo de la ĉina lingvo, en la nuna mandarena dialekto, la prononco estas [fó], kaj en mia dialekto, la kantona, [fat⁶]. Malgraŭ la fonetika ŝanĝo, la vortsigno restas⁽¹⁸⁾.

Alia okulfrapa fenomeno estas hibrida formo, kiu kunmetas indiĝenan kaj fremdan elementojn. En ĉina monaĥejo, ekzistas posteno, kiu respondecas pri la ordo ĝenerala. En la ĉina, ĝi nomiĝas *weina/weinuo* 维那 (skt. *karma-dāna*). La unua vortsigno signifas ordigon kaj la dua vortsigno estas fonetika transskribo de la lasta silabo de la sanskrita multisilaba vorto⁽¹⁹⁾.

La alveno de budhismaj elementoj, escepte de kelkaj fojfojaj protestoj de naciistoj, estis ĝenerale bonvenigita, kiel la transformiĝo de la ĉina lingvo montris. Menciinda estas ankaŭ la grava influo de la sanskrita skribsistemo al la ĉina kulturo ĝenerale (ĉine *shitan* 悉曇 /skt. *siddham*). La speciala skribmaniero de la literoj vekis grandan intereson kaj fantazion inter la ĉinaj kleruloj, kaj stimulis ankaŭ la sciencan studon de la ĉina fonetiko depost la alveno de budhismo en Ĉinion⁽²⁰⁾.

2.2 La “Nova Kultura Movado” kaj la lingva reformado en Ĉinio

Ĉinio dum la sekvaj jarcentoj post la *Song*-dinastio (10a-13a jc.) kreskis kulture kaj materie en tamen pli introspekta maniero. La alveno de kristanaj misianoj kaj la okcidenta scienco ekde la 16a jarcento estas sendube alia ondo de influo post la alveno de budhismo. La influo je la komenco ne estis tiom granda. Sed jam ekde la fino de la 19a jarcento, ĉinaj kleruloj ekinteresiĝis pri okcidentaj lingvoj, kaj novaj okcidentaj ideoj ekinfluis la ĉiutagan vivon de la ĉinoj, ŝangante la ĉinan lingvon kaj ankaŭ la ĉinan koncepton de sia propra lingvo⁽²¹⁾.

Tamen, kompare kun la najbara Japanio, kiu jam sukcesis lanĉi la *Meiji*-reformadon, Ĉinio ankoraŭ ne pretis akcepti Okcidenton. Jam en la 19a jarcento, Japanio malfermis sian pordon, kvankam iom hezite, kaj la historio de la kultura interŝanĝo dum tiu periodo speguliĝas en la lingvoj mem.

Tia malakcepto de Okcidento postlasis lingvistikajn markojn ĝis hodiaŭ, kaj en la ĉina lingvo kaj en eŭropaj lingvoj. Ekzemple, la ginko-arbo estis unu el la plej ŝatataj arboj en Ĉinio, kaj ĉinoj eĉ proponis, ke ĝi fariĝu la nacia arbo. Sed la vorto “ginko”

(el la strang-aspekta latina *ginkgo*) venis el la japana traduko de la ĉina vorto *yinxing* (银杏)⁽²²⁾. Simile pro la pli frua enkonduko de budhismo al la okcidenta mondo fare de la japanoj, budhisma meditado aŭ ties skolo estas konata en diversaj eŭropaj lingvoj kiel *zen*, sed nek kiel *chan* el la ĉina, nek kiel *dhyāna* aŭ *jhāna* el la sanskrita kaj palia.

Krom la ekzemplo de ginko, kiu venis en la okcidentajn lingvojn pere de la japana, ankaŭ troviĝas abundaj vortoj de okcidentaj devenoj, kiuj eniris la orientajn lingvojn, nome la ĉinan, pere de la japana. Ekzemple, la vortsignojn de la ĉinaj vortoj por filozofio (哲学), arto (美术) kaj eĉ Esperanto (世界语)⁽²³⁾ elkreis unue la japanoj kaj poste adoptis ilin la ĉinoj⁽²⁴⁾. La japanoj pli rapide akceptis kaj lernis el Okcidento ol la ĉinoj.

Post la disfalo de *Qing*-dinastio, intelektuloj kaj kleruloj interesiĝis pri lingva reformado. La klera ĉina lingvo estis anakronisma kaj ne uzebla por la ordinara vivo. Ordinartuloj ne kapablis uzi la klasikan lingvon, kiu ege malsamas al la modernaj ĉinaj dialektoj. Por promocii modernigon kaj rapide altigi edukan nivelon de la popolo, reformado de la ĉina lingvo estis necesa. Krome, la nova ĉina lingvo devas kapabli esprimi novajn ideojn, inkluzive okcidentajn ideojn. Jen la ĝermo por la “Nova Kultura Movado”.

Inter la aktivuloj de la “Nova Kultura Movado” estis tiuj, kiuj subtenis Esperanton. La centro de la movado estis Pekina Universitato, kie la rektoro Prof. Cai Yuanpei kaj pluraj profesoroj estis Esperantistoj⁽²⁵⁾. La titolo de la universitataj gazetoj en la 1920aj jaroj estis eĉ en Esperanto. S-ro Wu Zhihui 吴稚晖 eĉ opiniis, ke oni forlasu la ĉinan lingvon kaj ekuzu la internacian lingvon⁽²⁶⁾. Kompreneble, ne ĉiuj akceptis tiun proponon. Tio tamen montras la fervorecon dum tiu tempo. Inter la revoluciemuloj, la ĉinaj vortsignoj reprezentis ĉinan tradicion, kiu jam kadukiĝis kaj malhelpis al progreso. Ili volis ion novan, sed dum iom da tempo ankoraŭ ne povis decidi, kio anstataŭu ĝin. Krom Esperanto, la reformado de la lingvo kaj la vortsignaro estis la rimedoj.

Kiel menciite antaŭe, ekde la enkonduko de la sanskrita lingvo en Ĉinion, la ĉinoj jam konis la principon de fonetiko. Sed pro la antaŭjuĝo kontraŭ parola lingvo kaj obsedo kun skriba lingvo, la scienco de fonetiko malrapide progresis dum jarcentoj, kaj fariĝis esotera scienco nur inter la kleruloj. Tuj antaŭ la “Nova Kultura Movado”,

ekzistis pluraj proponoj por latinigi la ĉinan lingvon⁽²⁷⁾. La latiniga propono estas eble la plej ekstrema maniero okcidentigi la ĉinan lingvon, ĉar tio celis detrui la kor-animon de la antikva ĉina kulturo. Pro senĉesa polemiko kaj diversaj teknikaj problemoj, latinigado (kiel helpsistemo, sed ne anstataŭigo de vortsignoj) fariĝis realeco nur post la fondiĝo de komunisma moderna Ĉinio⁽²⁸⁾.

Tiu reformo estis latinigo aŭ alfabetigo, la t.n. *Pinyin*-sistemo. Dank’ al tiu sistemo, ĉiuj vortoj en la ĉina lingvo estas facile fonetike transskribeblaj. Laŭ la subtenantoj de *Pinyin*, tiu sistemo kontribuas ankaŭ al la reformado de la ĉinaj kulturo kaj modernigo. Oni ĝenerale konstatis, ke tio almenaŭ estas bona transskriba sistemo. Tamen, pro la lingva strukturo de la ĉina, precipe de la nordaj dialektoj, kies fonetikaj strukturoj estis tre simplaj kaj kies sinonimoj tro abundas, ne eblas, ke iu ajn alfabeto sistemo praktike anstataŭus la vortsignan sistemon⁽²⁹⁾. Inter la reformemaj akademianoj en komunisma Ĉinio ekzistis debato pri tio, ĉu tio fakte eblas. En la 1950aj jaroj, oni ja decidis fari tian lingvan revolucion – forigi la ĉinan vortsignaron por progreso de la lando (!)⁽³⁰⁾. Ĉiuj lernolibroj de la bazlernejoj estis transskribitaj en *Pinyin* kaj malaperis la vortsignoj. Post unu jaro oni decidis, ke tio ne eblas, kaj la vortsignoj revenis⁽³¹⁾.

Dum la du supre menciitaj historie gravaj periodoj, fremdlingvaj elementoj amase eniris la ĉinan lingvon. La reagoj de la ĉinoj estas miksitaj: la diversaj strategioj de ĉinizado de fremdlingvo kaj proponoj latinigi la ĉinan skribsistemon montras malsamajn nivelojn de akceptemo. La akceptemo kvazaŭ intime ligiĝas al la nacia memidenteco, kaj eble eĉ la memfido de la ĉina popolo dependas de la historia epoko. Dum *Tang*-dinastio, la imperio estis forta, kaj la ĉinoj fieris kiel *mezlandanoj*, kies kulturon la najbaraj landoj adoris. La ĉinoj tiam montris grandan pretemon konigi al la cetera mondo sian kulturon, kaj samtempe, lerni pri ĉio fremda, precipe el Barato, la siatempa Okcidento. Kontraste, en la finjaroj de *Qing*-dinastio, la imperio estis malforta kaj apenaŭ travivis invadojn de Okcidento. Tiam la lando stagnis kaj ĉinoj havis grandan dubon pri sia tradicio kaj ankaŭ pri ĉio fremda, malkiel la najbara Japanio, kiu rapide progresis pro sia akceptemo, samtempe konservante sian tradicion. En la dua kazo, malfeliĉe ni vidas, ke la ĉinoj tiam havis deziron detrui sian kulturon, kaj ironie ne tiom sukcese okcidentigi sin. La pluraj fenomenoj en la ĉinlingva medio tiel al ni rankontis.

2.3 La polemiko al lernado de fremdlingvoj

Pro la etnocentrismo de la ĉinoj ekde la antikva tempo kaj ankaŭ pro la granda lingvistika diferenco inter la ĉina lingvo kaj okcidentaj lingvoj, la ĉinoj neniam estis entuziasmaj pri lernado de lingvoj eŭropaj aŭ fremdaj ĝenerale⁽³²⁾. Malgraŭ longa historia kontakto inter Ĉinio kaj fremdlandoj, la unuan fremdlingvan instituton establis la Qing-dinastia registaro sufiĉe malfrue en la 19a jarcento, kiu poste fariĝis parto de Pekina Universitato.

En la moderna tempo, pro intima rilato inter Ĉinio kaj la siatempa Sovet-unio, la rusa lingvo fariĝis la unua fremda lingvo por komunisma Ĉinio. Sed ekde la 60aj jaroj, laŭ la rekomendo de S-ro Zhou Enlai, aliaj eŭropaj lingvoj denove revenis al altlernejoj kaj universitatoj. Kaj nun, dank' al la sinteno al malfermo de antaŭvidhava Deng Xiaoping, subite lerni la anglan fariĝis furore tra Ĉinio, malgraŭ ke lingvistoj ĉinaj ĝenerale opinias, ke fremdlingva edukado en la nuntempa Ĉinio estas kompleta "fiasko"⁽³³⁾.

Tamen, oni konstatas, ke la ĉinoj ekde pratempo estas tre praktikema popolo. Utilismo estas grava temo por la ĉina popolo. Lingvo-trejnado por ĉinoj dum 1500-jara historio ligiĝis al la imperia ekzamena sistemo. Por sukcesi en ŝtat-ekzameno, oni devis lerni la antikvan ĉinan lingvon, kiu estis kvazaŭ fremda lingvo por la lernantoj. Sukcesinte en la ekzameno, oni fariĝas ŝtat-oficisto kaj prosperos. Tio estas la pensmaniero de ordinaraĵ ĉinoj, eble eĉ ĝis nun – la modelo de sukcesa vivo. Tial, oni povas noti, ke nuntempe, anstataŭ la antikva ĉina, la angla kvazaŭ fariĝis la nova imperieksamena lingvo. La tuta ĉina popolo ekgrimpas la ŝtuparon de lingvolernado por sukcesi en la ekzamenoj. Por multaj ĉinoj, absolute ne gravas, ĉu oni povus komuniki en la angla. Pli grave estas, ke oni gajnu bonajn notojn en ekzamenoj, per kiuj oni eniros bonan universitaton, kaj per kiuj oni trovos bonan laboron. La utilismo de la ĉina kulturo faras ĉinajn studentojn eble unu el la plej diligentaj lingvolernantoj en la mondo.

Kontraste al utilismo ekzistas ankaŭ idealismo, kiu apartenas verŝajne ne al la ĝenerala popolo sed al la elitoj de la socio. Kiel mi antaŭe menciis, dank' al la subtenado de Esperanto fare de pluraj eminentuloj precipe ĉe Pekina Universitato, la internacia lingvo prosperis en Ĉinio. Dum tiu periodo, internaciismo estis la alvokanto por multaj edukitaj junuloj. Sed la historio jam montris, ke internaciismo malvenkis

kaj anstataŭe venkis naciismo. Esperanto ne fariĝis la dua fremda lingvo, kiel intencis la ĉinaj edukistoj dum la 1920aj jaroj, malgraŭ la efemera populareco de la internacia lingvo⁽³⁴⁾.

Ĉu la ĉiujare kreskanta statistiko de anglalingvaj lernantoj ne signifas la ĉinan pretemon de akceptado al Okcidento?⁽³⁵⁾ Persone, mi havas dubon pri tio. Rimarkinde estas, ke fremda lingvo ofte havas nur simbolan signifon en Ĉinio. Pro tio, oni ofte trovas anglalingvajn ŝildojn kun okulfrapaj eraroj tra la tuta Ĉinio⁽³⁶⁾. En strangaj lokoj oni trovas nekompreneblajn anglajn vortojn ĉie en Ĉinio, ĉu sur T-ĉemizoj de junuloj, ĉu sur mansakoj de maljunulinoj. Ĉiuj eksterlandaj vojaĝantoj al Ĉinio povas tamen atesti pri la lingva baro en la lando malgraŭ la obsedeca anglalingva lernado de la popolo. Sensencaj anglaj ŝildoj troviĝas ĉie, kaj foje oni povas trovi ankaŭ ŝildon kun *Pinyin*-literoj sen angla traduko. Tio estas iom mistera, al kiuj tiaj skriboj celas. Sed tio sufiĉe montras, ke fremdlingva edukado en Ĉinio ne celas forigi lingvajn problemojn. Anstataŭe fremdaj lingvoj rolas nur simbolece kaj aliciele por la ordinaraĵ, etnocentrismaj sed tamen utilismaj ĉinoj. Malgraŭ ĉio ĉi, la grandiganta akceptemo de fremdaj lingvoj ĉiam estas bona indiko, ĉar pli intimaj kontaktoj kun la fremdaj, ĉu lingve ĉu alimaniere, ĉiam ebligas al ĉiuj pli bone kaj pli profunde koni ne nur la aliajn, sed ankaŭ sin mem.

Postnotoj

- (1) La koncepto de Azio kiel geografia kaj kultura unuo estas ĉefe eŭropeca. Estas rimarkinde, ke la koncepto de ekz. *azianoj* ne estas universale akceptita. En studo farita de japana profesoro Inoguchi en 2000, montras nur 26% da japanoj konsideras sin kiel azianojn, kompare ol 80% da sud-koreoj. Thakur, Ramesh and Takashi Inoguchi: "Is Japan to mainland Asia what Britain is to Europe?", *The Japan Times*, Nov. 9, 2003.
- (2) Ĉinio en la ĉina lingvo *zhongguo* signifas la "centro-landon". Kvankam la ordinara uzado de *zhongguo* kaj *zhongguoren* (ĉino) estas relative nova, la egoismo de ĉina kulturo estas historia fakto. La plej frua mencio de la vortsignoj 中国, laŭ la ekzistantaj rekordoj, troviĝas en *Shangshu* el la 6a jarcento A.K. La koncepto ligiĝas al la koncepto de civilizacio ĉirkaŭata de barbaroj 尚书·梓材: 皇天既付中国民, 越厥疆土, 于先王肆. La etnocentrismo de la ĉinoj, same kiel aliaj longhistoriaj popoloj, tamen ne estu surprizo. Estas tamen rimarkinde, ke la ĉinoj ekkonsciis pri alia ebla mondcentro, kiam

- barata kulturo, precipe kosmologio, eniris Ĉinion pere de Budhismo ekde la unua jarcento P.K. Por pli detala diskuto pri la historia evoluo de la “centro” kaj la “orientiĝo” en la ĉina mondkoncepto, vd. Wang Bangwei (2005): “Luo Zhou wu ying yu tianxia zhi zhong” 洛州无影与天下之中, *Journal of Sichuan University*, 2005, No.4; Wang Bangwei (2007): “fojiao de zhongxinguan yu zhongguo wenhua de youyuegan” 佛教的“中心观”与中国文化的优越感, Manuskripto de la aŭtoro, eldonota en 2008.
- (3) Kompleta priskribo de la ĉina lingvo ne estas celo de tiu ĉi eseo. Por ĝenerala scio pri la lingvo, vd. DeFrancis, John (1984): *The Chinese Language: Fact and Fantasy*, Honolulu: University of Hawaii Press.
- (4) Ofte oni priskribas la ĉinan skribsistemon kiel ideogramaron. Fakte ideogramo, aŭ signo kiu prezentas ideon, estas nur unu el la pluraj formoj de ĉinaj skribsignoj. Pli ĝusta estas vortosigno (aŭ naturisme *vortsigno*), skribsigno kiu prezentas vorton, lingvistikan unuon. Inter lingvistoj, ekzistas tamen pluraj eĉ pli sciencaj priskriboj, ekz. “morfem-skribsigno”, “vort-silaba skribsigno” aŭ “morfem-silaba skribsigno” (Esperantaj tradukoj miaj el la angla). Vd. diskutojn en Qiu Xigui 裘锡圭 (2000): *Chinese Writing*, tradukita de Gilbert L. Mattos k. Jerry Norman. Berkeley: The Society for the study of Early China and the Institute of East Asian Studies, University of California, Berkeley, 22. Pri ĝenerala priskribo de la ĉina skribsistemo, vidu mian E-artikoleon “Ĉina skribsistemo”, *Juna Amiko* (1998/1).
- (5) Notu, ke vortsignoj mem daŭre evoluas malgraŭ la stabileco de la vortsigna sistemo ĝenerale. La nuna ĉina vortsignaro en *kai*-stilo estis kreita pli-malpli iom antaŭ 100 A.K. La “klasika vortsignaro” restas preskaŭ sama kiel antaŭ 2000 jaroj. La “simpligita vortsignaro” kreita de la lingvistoj dum la 20a jarcento estas uzata ĉefe nur en komunisma Ĉinio.
- (6) Rao Zongyi 饶宗颐 (1998): *Fuhao, chuwen yu zimu: hanzishu* 符號, 初文與字母: 漢字樹, Hong Kong: Shang wu yin shu guan.
- (7) La koncepto de sankta skribo en ĉina nacia psiko havas longan historion, plej notinde, ligite al la legendo la sanktulo Cangjie 倉頡, kiu kreis la unuajn vortsignojn. Eĉ en la moderna tempo, ĉinoj kredas, ke skribado intime ligiĝas al la interna stato de la homoj mem. Pro tio, bona skribado ne nur montras la virtecon de la persono, sed ankaŭ inverse, plibonigado de skribado pere de kaligrafia praktikado plibonigas la animon de la persono.

- (8) 為欲向西國人作學語樣仍各註中梵音下題漢字其無字者以音正之並是當途要字但學得此則餘語皆通不同者舊千字文若兼悉曇章讀梵本一兩年間即堪翻譯矣, (CBETA, T54, no. 2133B, p. 1197, a21-24).
- (9) Ekzemploj de tia manipulado de fremdeco abundas, kaj plej okulfrapas en la komerca mondo. Pli kaj pli da ĉinaj varoj ekemple nuntempe havas pseŭdo-okcidentan markon prezentatan kaj en la ĉina vortsigno kaj en la latina alfabeto. Ekz. la diĝita marko *Aigo*, anstataŭ *Aiguo* 爱国 (kiu signifas patrioton en la mandarena ĉina!), verŝajne havas pli fremdan sonon. Aliflanke, kiam oni tradukas la japanan markon *Sony* 新力 aŭ la mondĉenan manĝejon *MacDonald* 麦当劳, oni utiligas ordinarajn vortsignojn. La traduko de *MacDonald*, enhavante la kantonan familian nomon *Mak*, donas impreson, ke ĝi estus denaske ĉina nomo.
- (10) Kontraste la japanoj uzas apartan skribsistemon: *katakana* por fremdaj vortoj, kaj *hiragana* ĉefe por denaskaj japanaj vortoj, konservante samtempe ĉinajn vortsignojn: *kanji*.
- (11) Nur post la disvolviĝo de la scienco de kompara historia lingvistiko, dank’ al la studado de Sanskrito fare de eŭropaj filologoj, la scienco de lingvo rapide progresis kaj la mito pri la ĉina lingvo pli-mapli malaperis. En DeFrancis (1984), la aŭtoro klopodis senmitigi plurajn fantaziaĵojn pri la ĉina vortsigna sistemo, t.e. ties ideogrameco, universaleco, imitebleco, unusilabeco, nepreco kaj sukceso: 133-220.
- (12) La ideo, ke la ĉina vortsigna sistemo estas ebla modelo por “universala lingvo”, estis vaste diskutita kaj eĉ akceptita inter pluraj eŭropaj kleruloj. DeFrancis (1984): 163. Tamen, oni rimarku, ke Leibniz kaj ankaŭ aliaj poste eltrovis, ke ĉiuokaze la ĉinaj vortsignoj realece ne funkciis tiom logike, kiel oni imagis. Leibniz komparis la “malprecizecon” de ĉinaj vortsignoj kun tiuj de la egiptaj bildsignoj. Lach, Donald Frederick (1941): *Contribution of Chinese to German Civilization, 1648-1740*, doktora tezo, Universitato de Ĉikago: 93-94, citita en DeFrancis (1984): 289.
- (13) Wilkins, John (1668): *An essay towards a real character, and a philosophical language*, London: Sa. Gellibrand and John Martin. Por Wilkins, vortsigno kiu estas logika kaj scienca, funkcias kvazaŭ universala lingvo. Li aranĝis ĉiujn konceptojn laŭ kategorioj, celante, ke la strukturo de la lingvo spegulu la realecon (pro tio li nomis la sistemon “realan”). Vd. Apendicon A.
- (14) La nombro de la ĉinaj vortsignoj estas konstante kreskanta. En la *Qing*-dinastia vortaro

Kangxi zidian 康熙字典 troviĝas 47035 vortsignoj. En la moderna *Hanyu daizidian* 汉语大字典 troviĝas 54678, kaj la nova *Zhonghua zihua* 中华字海 (Ĉina Vort-oceano) enhavas ĉ. 85000. Laŭ la statistika esploro en 1976 fare de la ĉina Ministerio de Eldonado, ordinaraj ĉinoj bezonas konon de ĉ. 2400 vortsignoj por facile legi ĵurnalojn en Ĉinio.

(15) Pri la influo de sanskrita-ĉina tradukaĵo al la ĉina lingvo, vd. Zhu Qingzhi 朱慶之 (1992): *Fodian yu zhonggu hanyu cihui yanjiu* 佛典與中古漢語詞彙研究, Taipei: Wenjin Chubanshe.

(16) Por spekti ekzemplojn de la influo de sanskritaj budhismaj vortoj al la ĉina lingvo, precipe en la formo de idiomoj, vd. Liang Xiaohong 梁晓虹(1994): *Fojiao yuyan de gouzao yu hanyu cihui de fazhan* 佛教词语的构造与汉语词汇的发展, Beijing: Beijing yuyan xueyuan chubanshe.

(17) Laŭ Ji Xianlin 季羨林, pluraj ĉinaj budhismaj vortoj estas fonetikaj transskriboj ne el la sanskrita sed el aliaj centraaziaj lingvoj, ekz. la toĥara. Vd. la du eseojn de Ji Xianlin: *Futu yu fo* 浮屠与佛 (1947) kaj *Zailun futu yu fo* 再论浮屠与佛 (1989). Ambaŭ eseoj troviĝas en Ji Xianlin (2007): *Fojiao shiwu ti* 佛教十五题, Beijing: Zhonghua Shuju. Ekzistas ĝenerala tendeco de mallongigo de multisilabaj sanskritodevenaj vortoj, ĝis unu aŭ du silaboj, por ke ili aspektu ĉine kaj facile uzeblaj. Ekz. la ĉina vorto por monaĥejo estas *qielan* 伽藍 (skt. *saṃghārāma*). Tamen, laŭ la opinio de Ji Xianlin, 佛 ne estas mallongigo de 浮屠 sed fonetika prezento de la toĥara prononco de buddha.

(18) Iam profesoro de la ĉina filozofio diskutis kun mi pri la mirindeco de ĉinaj vortsignoj kaj klarigis al mi, ke la vortsigno 佛 signifas “ne-homo”. La klarigo estas jena: La maldekstra 人 signifas “homon” kaj la dekstra 弗 signifas “ne”. Surprizite de lia klarigo, mi klarigis, ke 弗 fakte estas fonetika signo. La respondo de la profesoro estas: “Eĉ se tio veras, kial oni elektis ĝuste tiun vortsignon inter multaj eblecoj?”

(19) Tia hibrida formo ne mankas en la ĉina lingvo, kaj estas strategio ĉinigi fremdadevenajn vortojn. Ekz. ordinaraj vortoj kiel biero (*pjiu* 啤酒 el angl. *beer*) kaj 冰淇淋 (*bingqilin* el angl. *ice cream*).

(20) Por ĝenerala priskribo de historio de *Siddham*, t.e. speciala skriba formo de la sanskrita en Ĉinio, vd. Van Gulik, R.H (1956): *Siddham*, Nagpur: International Academy of Indian Culture, 1956. Pli profundaj diskutoj el la ĉina vidpunkto troviĝas en Rao, Zongyi [Jao Tsuing-I] 饒宗頤 (1990): *Zhongyin wenhua guanxishi lunji, yuwenbian, shitanxue xulun* 中印文化關係史論集, 語文篇, 悉曇學緒論, Hong Kong: Xianggang zhongwen daxue

zhongguo wenhua yanjiusuo 香港中文大學中國文化研究所.

(21) Notinda estas la unua gramatika priskribo de la antikva ĉina lingvo, inspirita de la latina gramatiko fare de Ma Jianzhong 马建忠 (1898): *Mashi wentong* 马氏文通. Influema estis ankaŭ la rekonstruado de fonetiko de la antikva ĉina fare de sveda lingvisto B. Karlgren, per filologia kaj lingvistika metodoj. Wang Li (1984): *Zhongguo Yuyanxueshi* 中国语言学史, Hong Kong: China Books Press: 186.

(22) La latina plantnomo *ginkgo biloba* estas verŝajne erara transskribo de la japana *ginkyō* (origine ぎんきょう 銀杏), kiu ĉine signifas “arĝentan juglandon”. En 1690, la germana doktoro Engelbert Kaempfer kun la nederlandanoj vizitis Japanion kaj fariĝis la unua eŭropano, kiu science priskribis tiun ĉi planton. La nomo de la planto *ginkgo* (anstataŭ *ginkjo* laŭ ĝusta latina ortografio) aperis en ties verkaĵo *Amoenitates Exoticae* (1712) kaj estis uzita de la fama sveda botanisto Carl von Linné. Post tio la erara nomo restis. Por interesa diskuto pri la kialo kaj historio de eraro, vd. W. Michel. *Research Notes* (6. Dec 2005): <http://www.flc.kyushu-u.ac.jp/~michel/serv/ek/amoenitates/ginkgo/ginkgo.html/>

(23) Estas notinde, ke komence ekzistis pluraj ĉinaj tradukoj, kiel 万国新语 (“multlanda novlingvo”) eĉ fonetike kiel 爱斯不难读 (“amas vin, ne-malfacile legebla”). Finfine ĉinaj esperantistoj akceptis la japanan tradukon 世界语 (“mondlingvo”) kaj kontraste, japanaj esperantistoj mem forlasis tiun tradukon kaj preferas la fonetikan transkribon per la *katakana*-alfabeto: エスペラント.

(24) Pri eniro de okcidentaj vortoj en la ĉinan lingvon pere de la japana traduko, vd. Liu, Lydia H (1995): *Translingual Practices: Literature, National Culture and Translated Modernity, China, 1900-1937*, Stanford: Stanford University Press.

(25) Vd. artikolon de la aŭtoro, “La Pekina Universitato kaj Esperanto”, aperinta en *Memora libro por la la 25-jariĝo de Pekina Esperanto-Asocio* (2007).

(26) La propono de kompleta forigo de la ĉina skribsistemo el Wu Zhihui aperis en 1908 en *Shi Shiji* 新世纪 [Nova Epoko], anarkiisma gazeto farita de ĉinaj studentoj en Parizo. Laŭ Wu, “La nuntempa skribsistemo ne taŭgas kaj estas forlasenda eventuale... plej bone ke oni utiligu Esperanton...” 中国现有之文字不适于用, 迟早必废... 既废现有文字, 则必用最佳最易之万国新语..., citita en Ni Haishu 倪海曙 (1959): *Qingmo hanyu pinyin yundong biannianshi* 清末汉语拼音运动编年史 (Kronologia historio de ĉinaj alfabetoj/ Pinyin en malfrua Qing-dinastio), Shanghai: Shanghai renmin chubanshe: 185-190.

(27) Vd. Ni Haishu (1959), citita antaŭe. En Apendico A mi aldonis plurajn ekzemplojn de

tiuj ĉi eksperimentecaj proponoj.

- (28) Por detala diskuto pri latinigo de la ĉina lingvo kun ampleksaj referaĵoj, vd. DeFrancis (1984): 240-287.
- (29) Oni ja povas rimarki, ke la vjetnama lingvo ekz., forlasis komplete la ĉinajn vortsignojn kaj tamen funkcias sufiĉe bone kun modifitaj latin-alfabetoj. Sed la ĉina situacio ne ebligas tian solvon pro la ekzisto de tro da dialektoj tra la lando, kaj la nacia mandarena dialekto ne estas tiom ton-riĉa kiom la vjetnama sufiĉe por eviti sinonimojn. Ekz. la simpla ĉina vorto por "urbo" estas *shi* 市. Tiu latinskriba formo povas prezenti ankaŭ almenaŭ 66 aliajn vortojn: 是使十时事室市石师试史式虱矢拾屎驶始示士世柿拭誓逝势嗜噬失适仕侍释饰狮恃蚀视实施湿诗尸豕苒埶铈舐鲋鲋贯轼著筮熵溢弑螯匙什识食氏似嘘殖峙. Eĉ kun tona signo, ekz. *shì*, oni ankoraŭ havas pli ol 20 eblecojn. Estas verŝajne, ke la inform-kapablo de la latina sistemo ne sufiĉas por la ĉina lingvo. Pli profundaj diskutoj pri tiu ĉi temo troviĝas ankaŭ en: Hannas, William C. (1997): *Asia's Orthographic Dilemma*, University of Hawaii Press.
- (30) La alvoko de forigo al la tradicia ĉina skribsistemo komenciĝis dum la Nova Kultura Movado. Inter la plej elstaraj movadistoj estis Qian Xuantong 钱玄同 kaj Ou Shengbai 区声白, kiuj interalie estis fortaj subtenantoj de Esperanto kaj ankaŭ de anarkiismo. Diskutoj pri la socia etoso troviĝas en Müller, Gotelind (2001): *China, Kropotkin und der Anarchismus. Eine Kulturbewegung im China des frühen 20. Jahrhunderts unter dem Einfluss des Westens und japanischer Vorbilder*, Wiesbaden: Harrassowitz Verlag.
- (31) La aferon informis min Prof. Wang Bangwei. Tion li mem spertis dum siaj infanjaraj. La malsukceso de la komplete latinigado de la ĉina lingvo en lernolibro ne estis specife diskutita, kaj mi ankoraŭ ne povas trovi detalan raporton pri la afero. Ĝenerala diskuto pri la ŝtata latiniga programo tamen troviĝas abunde. Zhan Yinxin 詹鄞鑫: "Ershi shiji wenzi gaige zhengming zongshu" 二十世纪文字改革争鸣综述, *Zhongguo wenzi yanjiu* 中国文字研究, N-ro. 4 (2003/12).
- (32) La elstaraj esceptoj estas la fremdreligianoj aŭ misianoj kiel Xuanzang, kiu estis, krom fama vojaĝisto, unu el la plej kompetentaj lingvistoj en la ĉina historio. Dum lia restado en Barato, li partoprenis publikan religian debaton en la sanskrita lingvo kaj eĉ venkis. Li entute tradukis 75 titolojn kaj 1335 volumojn da sutroj.
- (33) En la 2006 sociscienca simpozio. Por pri neŭtralaj opinioj pri la disvolvigo de fremdlingva edukado en Ĉinio, vd. Wu Wenzhong 胡文仲 (2001): 我国外语教育规划的得与

- 失 (A matter of balance - Reflections on China's foreign language policy in education), *Waiyu jiaoxue yu yanjiu* 外语教学与研究 (2001/04).
- (34) Ĉe la kovrila paĝo de la fama junulara gazeto *Nova Junularo* 新青年, la titolo aperis krom en la ĉina, ankaŭ en la franca – *La jeunesse*. Por la studenta gazeto ĉe Pekina Universitato, dum la 1910aj jaroj, Esperanta titolo estis uzita kaj troviĝis ankaŭ artikoloj en aliaj lingvoj. Tio montras la internaciismon dum la periodo. Poste ekde la 30aj jaroj, oni ekuzis anglajn titolojn kaj la enhavo estis plejparte en la ĉina. Ekde la fondiĝo de komunisma Ĉinio, la titolo de la studenta gazeto estis nur en la ĉina lingvo. Nur dum la pasintaj jaroj, ni ektrovis denove anglajn titolojn (kaj kompreneble, sen angla enhavo).
- (35) "China Becomes Biggest Market for English Learning," *People's Daily*, Sep.27, 2002.
- (36) Apendico B. Pli da ekzemploj troviĝas en hejmpaĝoj kiel : <http://www.english.com/>

Apendico A – Fantaziaj inspiroj inter Oriento kaj Okcidento

- (a) La filozofia lingvo de John Wilkins (1668) – ekzemplo de la Dia Preĝo skribita de la logikaj vortsignoj inspiritaj de la ĉina.

Chap. II. Concerning a Real Character. 395

CHAP. II.

Instances of this Real Character in the Lords Prayer and the Creed.

For the better explaining of what hath been before delivered concerning a Real Character, it will be necessary to give some Example and Instance of it, which I shall do in the *Lords Prayer* and the *Creed*: First setting each of them down after such a manner as they are ordinarily to be written. Then the Characters at a greater distance from one another, for the more convenient figuring and interlining of them. And lastly, a Particular Explication of each Character out of the Philosophical Tables, with a Verbal Interpretation of them in the Margin.


The Lords Prayer.

Our Parent who art in Heaven, Thy Name be Hallowed, Thy Kingdom come, Thy Will be done, so in Earth as in Heaven, Give to us on this day our bread expedient and forgive us our trespasses as we forgive them who trespass against us, and lead us not into temptation, but deliver us from evil, for the Kingdom and the Power and the Glory is thine, for ever and ever, Amen. So be it. Ecce 1. (1)


Our Parent who art in Heaven, Thy Name be Hallowed, Thy Kingdom come, Thy Will be done, so in Earth as in Heaven, Give to us on this day our bread expedient and forgive us our trespasses as we forgive them who trespass against us, and lead us not into temptation, but deliver us from evil, for the Kingdom and the Power and the Glory is thine, for ever and ever, Amen. So be it. Ecce 1. (1)

- (b) *Yimu liaoran chujie* 《一目了然初阶》 (Fundamento de la tuj-komprenebla) de Lu Hanzhang 卢懋章 (1892)

La unua alfabeto sistemo proponita de ĉino, inspirita de la latinaj alfabetoj. La celo de nova sistemo laŭ la verkisto estas faciligo de lingvolernado, kiu estis absolute necesa dum tiu tempo. Oni notu tamen, ke jam ekde la antikva tempo antaŭ almenaŭ 1800 jaroj, la ĉinoj jam per rima kaj fonetika (*fanqie* 反切) metodoj analizis prononcon de ĉinaj vortoj. Kompreneble eŭropanoj, precipe misianoj, ektransskribis ĉinan lingvon per latinaj alfabetoj en la fino de Ming-dinastio (16a jarcento) aŭ eĉ pli frue. (Ni 24)




La “tujaj” alfabetoj de Lu estis popularaj en suda Ĉinio, precipe pro la *Xiamen*-dialekto. La ĉi-suba estis la alfabetoj en ĉinstila formo. Oni povas kompari tiun ĉi ideon kun la ankaŭ ĉinaspektajn koreajn alfabetojn *Hangul*. (Ni 27)




(c) *Chuanyin kuaizi* 《传音快字》 (Fonetikaj rapidvortoj) de Cai Xiyong 蔡锡勇 (1896)

Ambasadoro de *Qing*-imperio, Cai estis inspirita de la stenografio, kiun oni utiligis en tiutempa Usono. La “rapidvortoj” estas la unua alfabetiga propono de la norda ĉina dialekto. (Ni 35)



(d) *Guanhua zimu* 《官话字母》 (Alfabetoj de la Oficiala Dialekto) de Wang Zhao 王照 (1900)

La oficiulo Wang Zhao, post la malsukcesa *Weixin*-reformado, fuĝis al Japanio. Tie inspirite de la japana *kana*-sistemo, laŭ sia ĉina klereco li kreis la ĉinajn alfabetojn por la norda ĉina dialekto. Ĉi-sube estas konata konfuciisma lernolibro kun fonetikaj simboloj. Tiaj ĉi simboloj evoluis kaj fariĝis la nuna fonetika sistemo, ankoraŭ uzata en Tajvano. (Ni 98)



Apendico B – Anglaj ŝildoj en Ĉinio: Fantazio de lingvokapablo ?



Esperanto kiel lingvo kaj ideo en Ĉinio kaj Japanio

Ulrich Lins

La temo de tiu ĉi superrigardo estas la historio de Esperanto en orienta Azio, kun aparta konsidero al la rilato inter la lingvo Esperanto kaj la ideo aŭ ideoj, kiujn ĝiaj uzantoj ligis al ĝi⁽¹⁾.

Tiu rilato inter lingvo kaj ideo gravas tra la tuta historio de la Esperanto-movado. Prilumi ĝin en orienta Azio aparte interesas, ĉar Esperanto ekster Eŭropo kaj Ameriko nenie tiom disvastiĝis kiel en Ĉinio⁽²⁾ kaj Japanio⁽³⁾. Pro konsideroj pri spaco ni tie ĉi devas flankenlasi Koreion.

Ni unue vidu la staton de tiuj landoj en la jaroj dum la transiro de la 19a al la 20a jarcento.

- Por rezisti koloniigon Japanio elektis la vojon al modernigo, fortigante sin mem per la alproprigo kaj utiligo de scio el okcidento.
- Ĉinio postrestis. Ĝi suferis pro la malharmonio inter sia tradicio kiel potenca, memfida “regno de la mezo” kaj sia aktuala malforto, ne nur kompare kun okcidento, sed pli kaj pli ankaŭ kompare kun Japanio.

En ambaŭ tiuj landoj Esperanto estis komprenata unuavice kiel unu plia akiraĵo el okcidento. Nehazarde, la unuaj esperantistoj estis homoj, kiuj lernis Esperanton dum restado (ofte studado) en Eŭropo kaj poste portis ĝin en sian hejmlandon⁽⁴⁾. Ilia motivo estis: uzi Esperanton kiel ilon por havigi la scion de okcidento – ilo, kiu estis pli facile lernebla ol aliaj lingvoj. Tio validis por ambaŭ landoj, sed necesas konsideri, ke japanoj delonge uzis okcidentajn lingvojn, multe tradukante el ili, kaj frue sciis aprezi ilian utilon.

Ĉinio ne estis tiom progresinta. Ĝi ŝajnis preskaŭ malesperi pro la grandeco de la tasko trovi novan pozicion en la mondo. Signo de tiu malespero estis la pledo de

日本エスペラント学会紀要

Bulteno de Japana Esperanto-Instituto

エスペラント研究 第3号 2008年

Japana Esperantologio *n-ro 3 2008*

El la 92a Universala Kongreso de Esperanto

第5回 新渡戸記念国際シンポジウム より

マーク・フェテス

エスペラントはアジアの言語か？

プロバル・ダシグプタ

母語の活力：翻訳による言語の育成

論文

臼井裕之

北一輝のエスペラント採用論

かどや ひでのり